Esperanto Societo Frankfurto

Septembro 2023

ESPERANTO-INFORMILO



Foto: U. Fellmann, 31-a de julio ´23, 18:14 MEST
Tabulludantoj en la atrio de politekniko de Torino

Rubrikoj ĉi-numere:

- Programo
- El la klubo
- Eseo
- Rakonto
- Diversaĵoj
- Lasta paĝo

La septembra eldono de la Esperanto-Informilo aperas kunredaktita de Georgo (GH) kaj Ulriko (UF). La redaktoteamo deziras bonan legadon.

Kolofono
Redaktoro teamo:
Georg Hennemann
Ulrich Fellmann
Korektanto: Ulrich Fellmann

Esperanto-Gesellschaft
Frankfurt am Main
www.esperanto-frankfurt.de
Vorsitzender: Georg Hennemann
georg.hennemann@t-online.de
Rehgartenstr. 16
35683 Dillenburg
Tel. 02771-8196614

Bankverbindung:
Esperanto-Gesellschaft F.a.M
IBAN: DE75 5008 0000 0771 5717 01
BIC: DRESDEFFXXX
bei: Commerzbank Frankfurt

Jahresbeitrag
ESF+DEB-Beitrag: 96 €
Familienmitglied: 48 €
Nur ESF: 24 €
Familienmitglied: 12 €

Programo

Klub-Abende	Klub-vesperoj
Dienstag, d. 5. September 23	**mardon, la 5-an de septembro 23**
19:00 h MEST per Zoom	**19:00 h MEST per Zumo**
Offene Sprachrunde	**Malferma babila rondo**
Dienstag, d. 12. September 23	**mardon, la 12-an de septembro 23**
19:00 h MEST per Zoom	**19:00 h MEST per Zumo**
Geschlossene Sprachrunde (nur Mitglieder)	**Fermita babila rondo (nur klubanoj)**

Zoom-Ligilo: https://zoom.us/j/97497349753?pwd=OTBsMnladnA3UVhuRy9Ta0dYcFNldz09

surloke:

Saalbau MÜZ Schönhof
Rödelheimer Str. 38
60487 Frankfurt

Dienstag, d. 19. September 23	**mardon, la 19-an de septembro 23**
18:30 h MEST surloke	
18:30 h **Sprachrunde:** N.N „“	**18:30 h** **Babila Rondo**: N.N „“
19:30 h **Vortrag:** U.Fellmann & G. Hennemann “Über den 108ten Weltkongress in Turin“	**19:30 h** **Prelego:** U.Fellmann & G. Hennemann „Pri la 108-a UKO en Torino, Italio”

mardon, la 26-an de septembro, 23
ekde la 19h horo: **Senprograma samideana babila renkontiĝo**
Stattcafé, Grempstraße 21, 60487 Frankfurt am Main

El la klubo

Naskiĝtagoj

En aŭgusto kaj septembro festos sian naskiĝtagon:

01.08. Klaus Rumrich
29.08. Anina Stecay
24.09. Dennis Wibrow

Ni kore gratulas!

Antaŭanoncoj: 14.8. – 03.9.23 Saalbau Schönhof (MÜZ) Ferioj

- **Sabato, 16.09.23** 12:00-16:00 — **ESF infotablo** en la urbocentro ĉe Biebergasse apud ĉefgardejo(Hauptwache). Ĉiuj bonhumoraj Esperantistoj estas bonvenaj, precipe tiuj kiuj pretas alparoli preterpasantojn distrumpete kaj tamtami nian karan verdan lingvon
- **Sabato, 19.09.23** Ekde 18:30 — **Saalbau Schönhof:** Prelego pri la UK en Torino

Ĉu nia civilizita mondo baldaŭ kolapsos aŭ ankoraŭ estas espero?

Opinia eseo de G. Hennemann

En mia lasta artikolo mi diris ke la fenomeno de acedio (dt. Acedia), vorto kiu venas el la greka kaj signifas ‚senzorga sinteno' aŭ senzorgeco estas kompleksa temkampo kaj indus pritrakti ĝin en venonta artikolo. Mi do volas iomete pritrakti tiun temon el alia vidpunkto. Oni ja konstatas, ke tiu senzorgeco estas nun tre disvastiĝita, kaj precipe inter junuloj tiu sinteno kreskadis. Sed, kompreneble tiun aserton oni ne rajtas ĝeneraligi. Ekstrema formo de tiaj neŭrozoj estas la fenomeno de la tielnomataj fatalistoj (ankaŭ pereistantoj), aŭ en angla slango: ‚Doomer[1]', el, "persono (kutime jarmilano aŭ generacio Z kaj vira) kiu spertis ŝajnajn malfacilaĵojn (ekzemple rompiĝo de rilato, perdo de laboro, fiasko ktp.) kaj plene mergiĝis en apatio, memmalamo, deprimo kaj ĝenerale estas solemulo. Kutime dormanta aŭ laca tage kaj pli aktiva nokte, pasigante tempon en la interreto aŭ farante longajn noktajn promenojn ‚remaĉante depresiajn pensojn'. Ofte ili havas malmultajn aliajn ŝatokupojn, aŭskultante karakterizan muzikon kaj la pli malgajaj formoj de mezokcidenta ‚Emo-muziko'. Tiuj fatalistoj ofte volas normalan vivon, sed malfacile komprenas kial ĉio iras kontraŭ ili kaj longe kaj forte pensas pri vojo reen al normaleco. La vortoj ‚Doomer' kaj, per etendaĵo, ‚Doomerism' estas anglaj esprimoj kiuj ekestis ĉefe en la interreto por priskribi homojn kiuj estas ekstreme pesimismaj aŭ fatalismaj rilate al tutmondaj problemoj kiel ekzemple troloĝateco, naftopinto, klimata ŝanĝo, poluo, atombomboj, kaj forkuranta artefarita inteligenteco. Kelkaj de tiuj fatalistoj eĉ asertas ke ekzistas ebleco ke tiuj problemoj provokos socian perturbon kaj kolapson aŭ eĉ homan formorton."

Aliflanke nuntempe oni aŭdas ofte pri radikalaj grupoj kiel la "lasta generacio" aŭ "estingo-ribelo", (angle: extinction rebellion (XR)", kiuj estas kritikata pro iliaj provokaj, ĝenaj aŭ eĉ kontraŭlegaj agadoj, ekzemple kiam grupmembroj algluas sin sur aŭtostratojn malebligante trafikon kun la celo, ke la registraro faras ankoraŭ pli kontraŭ klimatŝanĝiĝo. Miaopinie ja estas tre aplaŭdinda ke multaj junuloj zorgas sin pri la estonteco kaj engaĝiĝas kontraŭ la negativaj sekvoj de la industriigita kapitalista mondo. Kaj estas pli bone sin engaĝiĝi ol resti pasiva kiel la plej granda parto de la homaro kiu aŭ rezignis pro la grandaj defioj aŭ estiĝis fatalistoj suferante tiom, ke ili bezonas psikologian helpon. La sola kritikpunkto kiun mi havas kontraŭ movadoj kiel ‚lasta generacio' kaj teorioj pri socia perturbo kaj kolapso (vidu ekzemple https://www.deepadaptation.info/) estas tiu, ke tiuj grupoj ŝajne malatentas la fakton, ke ili mem ege profitas de la moderna industriigita socio kun tutmondaj komercaj rilatoj, kiu ebligas senprecedencan libertempon kaj liberecon al la individuo. Sen liveri falsifikeblajn pruvojn ili pretendas, ke la civilizita mondo pereus jam en la venontaj dekadoj kaj ke ĉio jam estas tro malfrue. Tiu provokas nur pli da streso kaj konfliktoj inter la generacioj kaj la popoloj. Germana proverbo diras ke "Timo ne estas bona konsilanto". Pro tio mi multe pli simpatias kun grupoj kiel la „vaporpunkoj" kaj „solarpunkoj[2]", kiuj agas plejparte bonhumore, disvastiĝantaj positivan etoson kaj humoron. Do anstataŭ nur diskonigi negativan etoson kaj eĉ panikon, ili apelacias al niaj bonaj emocioj kaj motivigas nin pluevoluigi kaj aliformigi la hodiaŭan kulturon kaj socion. Se ni Esperantistoj interagadas nuntempe kun organizoj kiel Naturamikoj, ni ja ankaŭ povus interagadi kun aliaj grupoj aŭ movadoj kie ankoraŭ troviĝas engaĝitaj junuloj, ne laste por tielmaniere veki intereson lerni la internacian lingvon.

Resume mi tre bonvenas la agadojn kaj grupiĝon de la junuloj en amaso da novaj neregistaraj organizoj. Sed tiuj movadoj similas tamen iomete al la grupoj de la tiama eksterparlamenta opozicio (germane: außer-parlamentarische Opposition, APO) en Germanio aŭ al similaj grupoj en aliaj okzidentaj landoj: La APO estiĝis meze en la sesdekaj jaroj kaj estis tre populara kaj influhava, sed jam je la komenco de la sepdeka subite malaperis. Do, ni ja atendu nur ankoraŭ iomete, eble ĝis dek jaroj, kaj tiam ni jam povas konstati ĉu la "lasta generacio" pravas aŭ ĉu la kolapso forrestas kaj la homaro supervivas surtere.

[1] https://www.urbandictionary.com/define.php?term=Doomer

[2] https://www.urbandictionary.com/define.php?term=solarpunk

Rakonto

Mankis personaro en la oficejo, de Ulrich Fellmann

(Telefonalvoko)
"Saluton Ketino!"
"Saluton Andreas!"
"Kiel vi fartas?"
"Bone. Kiel vi?"
"Same."
"Miakalkule vi hodiaŭ 70-jariĝas! Gratulon!"
"Dankon!"
"Kaj vi hodiaŭ tamen laboras!"
"Jes."
"Kaj entute ankoraŭ laboras, ne pensiiĝis!"
"Jes. Sed kial vi alvokis?"
"Ni bezonas tri mil de la M-serio, tiuj kun 45 g."
"Bone. Prezo altiĝis per 4%, sed kiel bona kliento vi povas havi ilin por la malnova prezo."
"Dankon! Ĉu ĝis merkredo eblas?"
"Povas malfacili. Mi kapablas garantii ĝis tiam mil ducent, la ceteron ĝis sekvan lundon."
"Hmmm..."
"Ne eblas garantii pli, mi bedaŭras... vi ja scias, laborforto... mankas personaro."
"Do, konsentite. Se lundon por la fina livero vi garantias, tio sufiĉas."
"Mi garantias. Eble eĉ jam vendrede liveri eblas."
"Bone, dankon! Pago kiel kutime."
"Ankaŭ mi dankas. Ĝis la venonta!"
"Ĝis la!"

***

Jen la oficeja turo. Almenaŭ ekzistas tiu. La enirejo ne estas plena de poŝtkestoj... jen, eĉ enireblas. Kaj jen ricevejo kaj reala persono...
"Saluton!"
"Saluton! Kiel mi povas helpi?"
"Mi serĉas la oficejojn de la firmao zaTron."
"Kiun mi anoncu?"
"Matio Gezelman."
"De firmao..."
"Mi estas komisiito de kancelario Bordus&Bordus."
"La ekonomia agentejo..."
"Jes."
"Momenton... estas ĉi-tie s-ro Gezelman de kancelario Bordus&Bordus... jes... mi komprenas."
"Kio do?"
"Mi bedaŭras, ne eblas viziti nun, la estraro estas tuttage en konferencoj. Bonvolu kontakti rete!"
"Tion mi jam provis. Ĉu vi ofte vidis la personojn de la oficejo de zaTron venante kaj irante al la liftoj?"
"Mi bedaŭras, estas 53 etaĝoj kaj 18 firmaoj, entute pli ol 3000 personoj kiuj ĉiutage preterpasas mian giĉeton... mi rekonas multajn personojn, sed pleje ne scias kiu estas kiu."

"Mi komprenas. Je kiu etaĝo ilia oficejo estas?"
"Je la 47-a. Sed vi ne povas eniri sen permesilo kaj sen iu de la firmao kiu prenas vin de ĉi-tie enen..."

"Jen mia permesilo, juĝista decido ke mi rajtas eniri la oficejojn de zaTron..."

"Ho..."

"Mi preferus eviti voki policon por perforte plenumigi mian enirrajton..."

"Do jes, ŝajnas en ordo... mi donos al vi enirkarton kiun vi bezonos por trairi la aŭtomatajn pordojn kaj uzi liftojn. Uzu liftgrupon A, entajpu la 47 antaŭ ol eniri lifton, venos unu el ses liftoj por vi, rigardu la indikilon kiu montras la 47."

"Dankon."

Jen la sola oficejo sur la 47-a etaĝo sen informŝildo. La pordo ne malfermiĝas. Ne estas sonorigilo. Mi manfrapas la vitraĵon de la pordo. Neniu reago. Sed mi estas preparita. Speciala agento 13 havas la necesajn ilojn... universalan malŝlosilkarton retligitan al kvantumkomputilo en JuliĤo kiu solvas alirkodojn kun malpli ol 14 ciferoj dum sekundoj. Jen malfermite...

La lumo ŝaltiĝas. Odoras mucide. Mallonga koridoro, kun nur kvar oficejoj, unu necesejo kaj eta kuirejo. Ĉiu horizontala surfaco polvkovrita. Neniuj homoj. Kiu respondis la alvokon? Kiu diris, ke ĉiuj konferencas? Ĉu konferencejo estas aliloke? Ĉu ĝi okazas virtuale? Sed trairinte ĉiujn ĉambrojn evidentiĝas, ke ĉi-tie jam delonge neniu laboris...
En la fridujo en la kuireteto estas kelkaj pakitaj manĝaĵoj. La plej nova konserva datumo estas de antaŭ tri jaroj...

***

"Kiel tio povis okazi? Kiel tiu firmao funkciis?"

"Mi kontaktis la klientojn kaj liverantojn. Funkciis tiel: Ekde 2001 zaTron pli kaj pli da departementoj fermis kaj la servojn fremdliverigis. Unue ili fremdliverigis la financajn kaj librotenajn aferojn. Due la tutan produktadon, al firmao en Ĉeĥujo. Post tio ili ankaŭ translokigis la inĝenieradon al firmao en Nederlando. Iam restis nur la estraro kaj la klientkontakta servistaro, en kiu ili jam ekde 2020 pli kaj pli ankaŭ uzis babilbotojn. Komence nur por la tempo ekster la homa labortempo. Ekde 2023 ili eksperimentis per BabilĜCT3 kaj 4 kaj decidis iam, maldungi ĉiujn homojn."

"Restis do ankoraŭ nur la estraro..."

"Jes. Kaj ili unu post la alia mortis. La lasta, Andreas Grund, mortis antaŭ tri jaroj."

"Sed... kial neniu rimarkis?"

"Ili estis kopiintaj la personecojn al la AI, kiu telefone kaj retkonference ŝajnigis esti tiu persono mem. Mi eĉ eltrovis ke alia firmao kiu komercis kun ili faris la saman. Do, boto parolis kun boto."

"Kaj kiel oni iam eltrovis ke estas io duba rilate tiu firmao? Kial la financa supervidagentejo komisiis vin?"

"Estis kliento de zaTron kiu rimarkis strangaĵon. Ŝi mendis ion telefone ĉe la estro Grund, kiun ŝi iam konatiĝis, kaj pro tio ĉiam rekte alvokis por ricevi specialajn prezojn. La sekvan tagon ŝi serĉis retkrozile lian nomon kaj trovis retan mortanoncon, kiu diris, ke s-ro Grund jam delonge mortintis... tri jarojn antaŭ ol ŝi parolis kun li."

--

Diversaĵoj

Ŝerco (sendita de Gundhild):

La filo revenas de la lernejo fine de la lernojaro.
Li donas sian lernejan ateston al siaj gepatroj kaj diras:
“La ĉefaĵo estas, ke ni ĉiuj estas sanaj.“

Proverbo de la monato

La proverbo, kiun mi ĉi-monate prezentas, temas pri observado:

12. — Okulo de mastro pli ol beno de pastro. Ne fidu fidelulon, fidu propran okulon. Unu vido taŭgas pli ol dek aŭdoj.

Fonto: http://www.robkeetlaer.nl/esperanto/proverbaro/zam/teme_0012.htm

Mi tre ŝatas tiun triopan proverbon, ĉar ĝi motivigas **ĉiujn de ni ĉiam denove mem** fari propran bildon pri iu ajn aĵo, temo aŭ kredsistemo kaj precipe pri sin mem, do ne haste kaj blinde akcepti kaj transpreni iujn tradiciajn opiniojn aŭ kredojn – ĉu teologiaj, politikaj aŭ sociaj. Estas la homa misio neniam rezigni, sed eliri el la „kaverno al la suna taglumo“ (vidu https://www.themontrealreview.com/2009/Leaving-Plato-Cave) kaj ĉiam denove kontroli sin mem, ĝisfunde esplori, sondi kaj deĉifri la sekretojn de la ĉirkaŭa naturo, vivomedio aŭ de la socio en kiu ni hodiaŭ vivas. Do, rekomendindas doni al si la tempon, kaj kiel Platono konsilis, "alkutimiĝi al la lumo" de la vero pri ni mem. La estonteco de nia specio dependas de ĝi.

Enigmo (de Felmano Ulriko)

Ni serĉas la nomon de matematikisto kiu kreis planlingvon. Solvu la sekvajn demandojn kaj prenu la po indikitan literon de la solvovorto. Kiam vi vicigos ilin en la ĝusta vicordo, vi ricevos la familian nomon de tiu persono. Aldona demando: kiel nomiĝis la lingvo, kiun tiu persono kreis?

(1) Zamenhof naskiĝis en Rusujo kaj havis la rusan ŝtatanecon. Sed en kiu lando lia naskiĝurbo situas hodiaŭ? [1-a litero]
(2) Kiel nomiĝas la plej konciza planlingvo, kies nomo signifas "bona lingvo"? [6]
(3) Kiel nomiĝas frato de Zamenhof, kies persona nomo aperas kiel bestnomo en §5 de la Fundamenta ekzercaro? [2]
(4) En kiu urbo kreiĝis la unua Esperanto-klubo, surbaze de antaŭa Volapük-klubo? [1]
(5) Kiel nomiĝas la artefarita lingvo kreita en mezepoka Persujo, kiu miksis kelkajn tiajn regionajn lingvojn? [4]

Lasta paĝo

Pri sunfloro

Perfekta formo.
Reflektas somersunon,
Sunflorosuno.

Perfekta formo.
Sunomeze spiralo
De universo.

Sunfloro solas.
Tamen, tristan vin, homo,
Gajigi povas.

Sunfloro sola.
Sur kampo karesas ĝin
Zefiro mola.

Flavas la kampo.
Sunflorosunoj gajaj
Ridetas al vi.

Miregas Suno,
Centmiloj da sunetoj
Ĝin postrigardas.

Surteraj sunoj.
Multobligas la lumon
Kiel speguloj.

Oraj teleroj,
Tutplenaj da nutraĵo
Por homoj, bestoj.

Hirta sunfloro
Survestis verdajn korojn,
Danci esperas.

Klinas jam kapojn
La fieraj sunfloroj.
Venas aŭtuno.

Hajko *[2175] pri sunfloro, Aŭtoro: Elizabeta Tuboly, Dato: 2010/08/30(Lun) 05:09*
https://www.vastalto.com/hajko/ark11.html

--